



# LA PACDEFENDANTO



.....  
N-o.49. NEREGULA INFORMA CIRKULERO POR ĈEĤOSLOVAKIO, Januaro 1956  
.....

## ESPERPLENE EN LA 1950!

Por memori al niaj legantoj la komencon de nia movado ni decidis prezenti ĉi tie la ĉefartikolon el n-o.12.de decembro 1952, laŭ kiu ili mem povas konsideri la perspektivon, kiun ni donis al ili:

"Kiam antaŭ unu jaro ĉesis aperi la oficialaj organoj de la EACSRO "ESPERANTISTA" kaj "ESPERANTO SERVO" la duonoficiala eldonado de nia ministerio por informoj, la ĉeĥosl. esperantistoj perdis ĉiun kontakton inter si. La centra asocio ne plu trovis okazon aŭ ne kuragis alimaniere kontakti kun sia membraro kaj informi ĝin. La Asocio trovigis en agonio kaj apenau eldonis 3-foje unupagan cirkuleron, preskau nenion dirintan. La membroj ricevis nenian konkretan direktivon kaj estis lasitaj al sia propra sorto.

-En tiu situacio ekpaŝis sur sian postenon "LA PACDEFENDANTO" la sola ligilo de la senkapa amaso, kiu promesis daŭrigi la batalon por nia afero. Ĝi informadis la esperantistaron, konsolis kaj kuragigis multajn, kiuj jam komencis perdi la esperon. Multaj miskomprenis ĝian novan vojon, multaj dubis pri ĝia vivebleco, sed finfine ĉiuj tamen kolektigis sub ĝia standardo.

-Kiam la unuopaj delegitoj sub gvido de la landa asocia komitato voĉdonis por la "liberyola" likvido de la Asocio kun ĝiaj grupoj, jam estis renaskiĝinta la Esperanto-movado en Ĉeĥoslovakio sub la gvido de "LA PACDEFENDANTO".

Ĝi komencis per nenio kaj akiris la simpatiojn de ĉiuj. Ĝia vojo estis rekta, ĝusta kaj korekta, ĝia batalo brava kaj honesta. La ĉeĥoslovakaj esperant-

istoj ricevis novan direktivon, direktivon, utilan al la homaro, batali per Esperanto por la paco kaj socialismo, batali por la interkomprenigo de la homaro. Ili bone komprenis sian taskon. La iamaj grupoj, perdintaj sian centron, aligis kiel rondetoj al naciolingvaj uzinaj kaj urbaj kulturaj kluboj. Ili ekpaŝis la plejgustan vojon por enpenetri largajn laborulamasojn. "LA PACDEFENDANTO" sukcesis konvinki ilin, ke la Esperanto-movado povas akiri sole tian sian vivrajton, se ĝi enpenetras kaj profunde enradikigos en la masorganizoj de la laboristaro por praktike servi per Esperanto al ili.

Ni venis malfrue, sed se ni nun kun duobla verve eklaboros, ankoraŭ eblas regajni la perditan pozicion kaj eĉ plivastigi ĝin.

Ni gajnis jam tre multe. -Imagu kio estus okazinta, se ne estus veninta ĝusta ompe "LA PACDEFENDANTO"? Kio estus okazinta kun la esperantistoj, kiuj perdis sian gvidon kaj direktivon, senĝataj, neinformitaj kaj senkontaktaĵaj? Kio estus okazinta, se ni ne jam de januaro estus intervenintaj kaj protestintaj kontraŭ la rekomendita likvido de la Asocio kaj la malpermeso de ĝiaj organoj? Certe la Asocio jam multe pli frue estus likvidinta kaj la Esperanto-movado eble finfine sufokita same kiel jam okazis en aliaj landoj, kie la esperantistoj ne sufiĉe kapablis defendi sin kontraŭ la atakoj. ./.



Vidu nur, kiom da riproĉoj kaj ofendoj ni devis rifuzi. Oni nin ŝtampis kosmopolitikistoj, servuloj, de burga lingvo ktp., sed dank'al L.P. ni persistis. La memkonseieco pri la pravenco de nia vojo, kiuj infikis kaj ekvekis en la ĉeosl. esperantistaro la artikoloj de tiu ĉi gvidilo, donis al ĉiuj novan vivenergion kaj kuragon persisti. Kaj tiujĉi novakceptitaj ecoj havis sian influon ĉe la decidaj organoj, kiuj devis konstati, ke ne estas tiom tute facila sufoki nian movadon. Ni pro tio sukcesis konservi la rajton vivi, spite de la malfacilaj kaj antipatio, kontraŭ ni dissemita laŭ la cirkonstancoj en diversaj lokoj de nia lando kaj laŭ la firmeco de niaj tieaj gesamideanoj.

"LA PACDEFENDANTO" aperas nun unu jaron, ni kredu, ke ĝia influo inter la esperantistoj kaŭzis pli valoran laboron ol la multjara agado de la likvidita centro sur neutrala bazo. Nun eĉ, se devus "LA PACDEFENDANTO" iri flanken, la semoj estas jam semitaj! Ĝia unua tasko estas plenumita. Vekigis centoj da klas-kaj celkonsciaj esperantistaj gek-doĵ, kiuj malgraŭ ĉiuj baroj, dum ĉiuj cirkonstancoj daurigis la montritan vojon, la vojon, kiu kondukas al la venko de internacia interkomprenigo, proleta internaciismo, socialismo kaj tutmonda paco. "Ne al glavo sangon soifanta" sed al unu granda homa familio, unu la alian sin amanta! Rudolf BURDA "

Tiel ni vidis perspektivon en decembro 1952. Hodiaŭ, en la 1956 jaro, ni jam havas pli klaran vidon por la estonto de nia movado. Mi ne volas ripeti la raportojn kiuj estis jam al vi prezentitaj sed necesas tamen konstati, ke el nia impulso kaj iniciativo naskigis la Mondpaca Esperantista Movado/MEM/, revekigis la movadojn en Bulgario, Hungario, Polio, Vietnamo kaj aliaj Popoldemokratioj. Renaskigas sub nia devizo nova movado en la granda Sovjet-Unio, Esperanto estas instruata jam en kelkaj popoldem. universitatoj, tre baldaŭ ĝia voĉo audigos en ties radioelsendoj kaj fine eble

ankau ĉe ni reaperos presitaj Esp-gazetoj kaj radiorelacioj kun oficiala aprobo. Nia Unua Tutŝtata konferenco en 1955 donis la impulson al oficialaj instancoj rigardi kaj konsideri nian movadon utilan. La vizito de bulgara k-do. profesoro C. Murgin estis ankau grava kontribuo. Ni intencas organizi ankoraŭ pluajn vizitojn de eminentaj esp-istoj al Ĉeĥoslovakio por antaŭenpuŝi plenan legalecon al nia movado.

Dank'al la kompreno kaj helpo de niaj kunbatalantoj, ni preskaŭ jam sukcesis likvidi ankau niajn financajn malfacilajn k. la plialtigo de nia jarabono, kiu estis kun kompreno de niaj abonantoj akceptita, malpermesos tute certe ripeton de simila situacio fine de la nuna jaro.

Ni do povas kun plena espero eniri la novan jaron 1956, ke, se ni kiel ĝis nun daurigis nian agadon, ne lacigante, sed ankoraŭ pli forte kaj insiste batalante, tiam la nova jaro ne nur alportos por nia movado novajn sukcesojn sed eĉ gravajn venkojn se ne venkon definitivon.

R. BURDA

S I N C E R A N D A N K O N

Al ĉiuj gekamaradoj en Ĉeĥoslovakio kaj eksterlando, kiuj okaze de la Kristfestoj kaj Novjaro sendis al mi persone kaj al la redakcio siajn bondezirojn. Ili ĉiuj estis entusiasmigaj kaj kuragigaj. Ne eblas aparte al ĉiuj respondi, sed ankau mi esprimas per tiu ĉi vojo en la nomo de la redakcio kaj administracio al vi ĉiuj kaj ceteraj niaj abonantoj kaj kunbatalantoj miajn plej ardajn bondezirojn kun la peto, ke ankau en tiu ĉi jaro ni restu kunligitaj kaj persistaj en nia komuna batalo por pli feliĉa estonto de la honaro! R.B.

GRAVA HISTORIA DOKUMENTO

estas la jarkolekto de LA PACDEFENDANTO-1955. En ĝi respeguligas vere historie gravaj okazintaĵoj el nia movado. La volunaro ampleksas 104 pagojn /kompleta jarkolekto/ kaj estas aĉetebla ĉe nia redakcio por 12 Kčs au 16 int. resp. kuponoj. El eksterlando ni rekompence akceptas ankau samvaloran literaturon k. simile.



MONDA KONGRESO POR MALPERMESO DE NUKLEAJ ARMILOJ

Okaze de la 10jara datreveno de la atomeksplodoj en Japanio oni havis en Hiroŝima Mondkongreson por malpermeso de nukleaj armiloj la 6-8. de aŭgusto kun la celo firmigi la solidarecon de la popolamasoj kontraŭ la A-kaj H-bomboj kaj pristudi la problemon "kiel nuligi la nukleajn armilojn for de la tero".

Antaŭ la kongreso okazis per religia rito memoriga ceremonio pri la 10jara datreveno de atombombeksplodo sur la placo, kie nun staras monumento de la viktimoj. Partoprenis ĉ. 30.000 personoj el diversaj partoj de la lando kaj el eksterlando. La urbestro de Hiroŝima, estraranoj de la kongreso, reprezentantoj de la atombomb-viktimoj, kiuj gisvivis hodiaŭ kaj aliaj sinsekve oferis girlandojn sur la monumenton, sur kiu ĉiuj estis as la vortoj: "Viaj spiritoj ni pozu en paco; la sama eraro neniam estos ripetita." La momento de fatalo "15 minutoj post la 8a horo", eterne ne forgesiĝas - alvenis. Sub la resonado de sireno ĉiuj ĉeestantoj kaj ĉiuj loĝantoj de Hiroŝima/360.000/faris unuminutan preĝon por la viktimoj, ĉiu ekstarante laŭ sia pozicio ĉe laborejo, ĉe hejmo k. ĉe aliaj postenoj kaj lokoj.

La kongreso komencigis je la 10a-horo en Publika Halo. Ĉeestis ĉ. 2.000 japanaj delegitoj k. 30 ne-japanaj el 10 landoj. Inter multaj salutoj kaj mesaĝoj plej impresis tiu de s-ino Crnsted, sekretarino de USONA VIRINA ASOCIADO "CLOPOR INTERNACIA PACO KAJ LIBERO"; ŝi simple sed kortuŝe espritis sian pardonpeton al la Japanoj, agnoskinte unuflankan kulpon de Usono koncerne la uzon de atombomboj super Hiroŝima kaj Nagasaki. La diverstaj raportoj de specialistaj ekspertoj pri internacia solidareco, pri la malhona krueleco de nukleaj armiloj kaj pri la granda domago farita de la A-kaj H-bomboj estas pro ĉe tre valoraj dokumentoj. La vesperfesto por la 10jara datreveno de eksterlandanoj granda plendi en la vasta

placo jam menciita. En la programo ne mankis ankaŭ aruzajtoj: kantoj, horoj, dancoj, baletoj k.a.

La duan tagon estis 6 fakkusidoj. Ĉiun kunsidon partoprenis po ĉ. 10 atombomb-viktimoj, el kiuj kelkaj, reprezentante ĉiujn aliajn sansortanojn, publike rakontis kia estis la homa katastrofo en Hiroŝima aŭ en Nagasaki kaj ankaŭ pri la de ni neimagineblaj suferoj kaj afliktoj, kiujn ili devis trasperti dum la pasintaj 10 jaroj. Plejmultaj el ili estis virinoj. Kiu el ni aŭskultis sen malbena al milito? El inter la aŭskultantaro aŭdiĝis tie kaj ĉi tie plorsingultoj. Kelkajn vortojn aŭskultu ankaŭ niaj legantoj.

Fino Misa JAMAGUCI el Nagasaki:

"En la unuaj kelkaj jaroj post mia viktimo, mi baraktis duonmorte interne pro la sola demando, kiu min mordadis: ĉu min mortigu aŭ vivu, kaj memmortigo estis pli facila. Sed apenaŭ mi ekpensis kiu ja povus post mia morto pli bone diskonigi al la mondo la atombomban kruelecon, ol mi, la vivmodelo de la viktimo, kun la postsignoj sur la korpo, mi decidis plu vivi - nepre vivi por la nova vivo spite ĉiuj malfacilaĵoj, kiujn mi renkontos dum la vivo.

\* \* \* \*

S-ro. Itto HIRAMOTO, direktoro de Asocio por A-bomb-viktimoj en Hiroŝima:

"La A-bombo falinta sur Hiroŝima en 1945 forrabis ambaŭ okulojn de mia edzino kaj la dekstran de mia sola filino. Nia tuta familio nun havas nur tri okulojn por tri membroj. Mi ofte sentas kvazaŭ vivi kun monstroj. La ĉiutaga realo estas tion severa kaj griza por mi, ke ial ne estas tre gojige al mi, trovi tion de festeco en tiu ĉi kongreso. Pardonu, sed bonvolu gustumi ankaŭ la krudan voĉon de mi, viktimoj, kiuj spertis kaj ankoraŭ spertas multajn suferojn!"

\* \* \* \*

En la laborkunsidoj disvolviĝis seriozaj debatoj, kiuj rezultigis gravajn rezoluciojn. Tamen



ilin ni devas ellasi pro nanko da loko.

La 3. tagon estis Ĝenerala kunveno en Publika Halo. La antaŭa parto de la kunveno konsistis el raporto kaj pritrakto de rezolucioj. S-ro. Iku Jasui la ĝenerala sekretario resume prezentis la rezoluciojn. Poste oni publikis la proklamon, alvokon kaj deklaron en la nomo de la kongreso pri la antaŭenigo de la movado kontraŭ la A-kaj H-bomboj laŭ pli ampleksa tutmonda skalo. La publikigo de la kongresa deklaro estis la kulmina punkto de la kongreso. El la deklaro ni citas la jenajn vortojn:

"La reala mizera stato de la atombomb-postvivantoj estas ankoraŭ multe kaj vaste diskonigenda tra la mondo. Kaj por protekti ilin, ni devas urĝe disvolvi grandan internacian movadon

Ĉi tio estu la bazo sur kiu la movado kontraŭ la nukleaj armiloj devas marŝi. Ĉiuj atombombpostvivantoj konsoligos kaj savigos en la vera senco de la vorto, nur kiam la nukleaj bombuoj estos plene malpermesitaj." Kaj finiĝas per la vortoj: "Nia movado ĵus hodiaŭ antaŭenmetis sian unuan paŝon. En la firma kunlaboro kun la mondpopolo ni koncentrigos nian forton kontraŭ la nukleaj bomboj ĝis la tago de la venko, kiam ĉiuj nukleaj bomboj estos abolitaj, iliaj stokoj detruitaj kaj la armeoj liberigitaj al paca laboro. Ni ĉiam vidas antaŭ ni la estontecon de la brilanta mondpaco!"

La Kongreso finiĝis per la ĥoro de la solen-melodia "L'Atombombon ne lasu plu ni". Kantis la tuta ĉeestantaro.

Intertempe okazis ankaŭ konferenco de religianoj, kiun parto prenis en la Memoriga Halo de St. Xavier en Hiroŝima 215 delegitoj de diversaj religioj, kiuj publikis apartan "Hiroŝima-deklaron". En la kadro de la kongreso estis instalita impona ekspozicio de materialoj pri la atombombaj domagoj. La supra raporto estas kopiita parte el jap. Esp-gazeto "COMOTO" n-o. 7-8. Ni opinias necese prezenti al niaj legantoj ĉi raporton, ĉar nur tre malmulte

raportis pri tiu ĉi grava okazintaĵo la ĉeĥoslovakaj gazetoj.

Estas ankau stranga afero, ke la Kongreson ĉeestis nur 30 eksterlandaj delegitoj el dek landoj. El tio eblas konsideri, ke la ceteraj popoloj, kiuj ne estis reprezentitaj eĉ ne havas intereson pri sia propra sorto. Ni petas la japanajn gekdojn, informi nin kial ne plimulte da eksterlandaj delegitoj povis partopreni tiun ĉi kongreson.

La red.

A Ŭ R O R O

Vi estas la aŭroro de la PACO. Usonanoj, dungitoj de la Morto, vin torturis per superhoma forto; sed, se oni fifaris vin viktima, estas tre enviinda via sorto,

Hiroŝima,

ĉar vi igis praviga fundamento kontraŭ pluaĵa atako kaj turmento. Fariginte proprajo de la mondo la atomo ne estas plue krima. Iĝas nun tre danĝera la respondo, kiu estus atome legitima.

La hororo de tia hekatombo malfermigis dorlote la flugilojn de la paca kolombo, kiu ŝirmos estonte siajn filojn forpuŝante nukleajn mortigilojn. Ĉu iu ajn grimacos? ....

La grimaco

ne provokos militon. Ĉiu tima, ne transsaltos la limojn de la minaco.

Vi lumigis la aŭroron de la paco, Hiroŝima!

Saldanha CARREIRA

NOVAJ KUNBATALANTOJ

La 3.12.55. fondigis nova Esp-Pac-rondo ĉe la "Ballasi Bálint Kulturdomo en depart. urbo Békéscsaba. La estraro de la Kulturdomo favore disponigis al ĝi belegan ĉambro, kie funkcias ĉiŝabate vespere kursoj por komecantoj kaj progresintoj. Nia urbo troviĝas en Sud-Hungario, kie estis ĝis la lasta tutlanda Esp-kongreso, okazinta en najbara urbo Gyula, tre vigla Esp-movado. La fondigo de la rondeto en la departemento Békés espereble donos pluan impulson al renaskigo de Sud-hungara Esp-movado. La grupo ligos firmnan kontakton kun la Departementa Packonitato.

D-ro. Bálint SZEMENYEI



Dro J. ČERNÝ:

### KIAL ONI STAGNAS OKCIDENTE?

En okcidentaj landoj oni plendas pri la stagno de nia movado kaj nin, en la landoj popoldemokrataj, envias asertante, ke iom da persekutado ne malhelpis, ja eĉ antaŭenpuŝas.

Kial ni ĉi tie progresas? Ĉar ni sciis trovi konvenan vojon al la oficiala ideologio. Certe okcidente ekzistas ankau ideologioj - do necesas trovi ankau vojojn kaj lau ili agi. Krome, oni tie havas tute liberajn manojn prese, papere ktp., do mi proponas jenan agmanieron:

Fondi tuj traduksocietojn kaj eldonsocietojn kaj tuj tradukadi

1. ĉiuspecajn verkojn sciencajn, au tute au lau enhance au resume kaj same politik. verkojn.
2. Literaturon ĉiuspecan.
3. eldoni malnovajn, kompletigitajn vortarojn, eldoni mankantajn fakvortarojn/maŝinfakon, hemian, fiziko-matematiko-astronomian k.a.
4. Eldoni de ĉiu el supre cititaj en ĉiu lando minimume mil ekz-ojn au prese au multobligitate.

Kion signifos, se ĉiuj esperantistoj en ĉiuj landoj tradukos siajn naciajn verkojn ĉiujare kaj ĉiam kiel eble plej baldaŭ? Ke ni, esp-istoj, havos ĉiam plej novajn kaj plej freŝajn librojn, de ĉiuj popoloj kaj specoj, kiujn ni povos proponi kiel informilojn al kiu ajn, kaj dum jaroj, se ni ne lacigos, ni havigos al la mondo tian dokumentan materialon, kiu neniu nacio povos al si havigi. Plue simpleco kaj facileco helpos nin kompare al tradukoj en aliajn nacilingvojn. La homaro, literaturistoj, gazetistoj, politikistoj, scienculoj, ĉiuspecaj interesusuloj kutinos serĉi en Esperantujo informojn ĉiuspecajn, kaj ni, nevole farigos la centra tutmonda informejo, kaj senpera venko de Esp-o el malsupre estas certa. Do, uzante la vortojn de nia majstro: "semante konstante, neniam lacigante, nia diligenta kolegaro".... ĉesos envii la popoldem. landojn, ĉar ili povos en siaj landoj nuntempe proponi al la mondo multe pli, ol ni, kies eblecoj estas ankoraŭ limigitaj.

Krome mi ne kalkulis kun plusa profito, nome pure esperanta. Ni ĉiuj scias, kiel monotonaj ne interesaj farigas niaj esp-kunvenoj. Kial? Nur pro tio, ke ni ne havas materialon, ni ne povas havigi al niaj legantoj, niaj legantoj librojn, legajojn lau ilia intereso. Ne sufiĉas por ĉiu nur kelkaj libroj, kiuj plaĉas al tiu au alia tradukanto kaj lia elekto sed ĉiu volas satigi sian soifon en Esperanto lau siaj imagoj. Do, ni havigos al nia anaro dum kelkaj jaroj tiel kolosalan materialon, ke ni tute prave povos fieri pri la stato de nia movado, kion ni ĝis nun ne povas diri nur pro tio, ke ni tro multe mallaboris kaj nur sopirgemis, ke la superuloj, aŭtoritatuloj, nin ne favoras. Ĉu ni montris al ili ion krom la esperanta babilado kaj kelkaj imponaj kongresoj? Ĝis nun tute ne. Do, ne sopiri al iu speco de martireco, sed la b o -- r e n o estu nia devizo kaj ĉiama farado, agado kaj oferado de niaj servoj.

Kiel pluan klarigon mi volas aldoni: kompreneble, nombro de mil estos ie kaj iam palmulte, ie kaj iam tro multe. Ĝi prezentas mezan nombron, kiu ĉiu lando arangu lau siaj eblecoj. Sed, se montrigos intereso pri iu el la tradukoj, kiu ekzemple trovigas en resumo, oni povos ĝin tuj komplete traduki kaj eldoni en pli granda kvanto lau la intereso. Sed necesas, ke ni estu elastaj, elastaj ne nur politike, sed ankau praktike. Nur tiam, se ni agos konvene kaj lerte kaj per faktoj, ni venkos pli frue.

Alvoko al MEM-anoj kaj ĉiuj esperantistaj pacdefendantoj. Konforme al la supra artikolo fondu ĉie tradukfondetojn, kiuj kiel eble ĉie almenaŭ unu bone scien k. lertan esp-iston. Oni elektu ion por traduko kaj por ne labori pri la sama temo necesas unuigi niajn fortojn. Tial anoncu al ni la nombron de viaj tradukantoj, nomon kaj nombron da pagoj de tradukotaj libroj k mi donos pliajn konsilojn. Adr.: MUDr. Josef ČERNÝ, Nan. Republiky č. 22/II., PLZEN, Ĉeĥoslovakio.



## PRI ĈINAJ KAPITALISTOJ

Por ke vi komprenu la novan POPOLAN ĈINION kaj iom eduku ties malamikojn, jen traduko de intervjuo, kiun havis ĵurnalisto de "WORLD NEWS", M. Shapiro kun ĉina milionulo. Tiu industrialisto estas Jung-i-jen, posedanto de teksejoj kaj farunejoj, kies valoro proksimigas 40,000,000 dolaroj:

En 1949, kiam alproksimiĝis la popolarmeo al Shanghai, la frato kaj kuzo de Jung-i-jen forflugis. Sed li mem, kvankam li timis la komunistojn, hezitis. Li treege malŝatis fariĝi Ĉino senŝtata, senpatruja; ankaŭ li ne povis forŝiri sin de siaj grandaj posedaĵoj. Iom post iom, li rakontas, miaj suspektoj velkis. La nova registaro bonege gvidis, provizis krudmaterialojn, mendadis kaj aĉetis la produktaĵojn. Gelaboristoj montris novan homan dignon kaj fieras pro tio, ke la proletoj estras. Tre plaĉis al li la forta, sendependa konduto de la popola registaro kontraŭ USA. dum la milito en Koreio. De la jaro 1949 ankaŭ ĉe li mem kreskis fiero, ke li estas Ĉino. Li rimarkis ĉie tra la lando rapidan forigon de koruptado, de la malvirta opio-uzado, prostitutado, fikomercado kaj vetfarado. Samtempe ekfloris la industrio kaj kreskis gigantaj novaj konstruaĵoj.

"Mi scias, "li diris", ke oni aliformigas la kapitalismon. La komunistarta partio malkaŝe klarigis tion. Je la fino de la tria kvinjar-plano, post alia proksimume 12 jaroj, la privata kapitalismo tute malaperos. Sed la registaro projektas glatan ŝanĝon kaj dume ni, la kapitalistoj devas nin prepari per tiu nova estonto".

Tiu ĉi june aspektanta industrialisto, skribis Shapiro, estas sufiĉe juna por postvivi tiun ŝanĝon - li havas 40 jarojn.

Jung-i-jen ekpartoprenis en la familia komercado en 1937. Lia patro establigis farunmuelejon antaŭ la jaro 1900, kiam Ĉinio devis cedi la insulon Tajvan/Formosa/al Japanio. La patro

tre indignis pri tiu afero kaj ankaŭ pro la fremdlandanoj, kiuj importadis farunon libere de imposto kaj dumpingis ĝin. Tamen, malgraŭ ĉio la muelejoj prosperis kaj la familio komecis riĉigi. Dum la 1. mondmilito ili multe profitis kaj pli grandigis. En la jaro 1937 la produkto de faruno estis 80.000 sakoj ĉiutage kaj la teksejoj povis kalkuli 600.000 ŝpinilojn. "Sed", diris Jung-i-jen, "estis tre malfacile por ni kontraŭi kontraŭ la privilegitaj fremdlandanoj. Ankaŭ minacis nin la regimo de Sang-Kai-Sek. Ties bofratoj H.H.Kung kaj T.V. Soong manipulis la financojn kaj elsuĉis ĝisoste entreprenon, kiun ili sukcesis enretigi. Soong provis perfidi la kompaniojn de la Jung-i-jena familio; sed pro drastaj ekonomioj kaj malaltigoj de laboristaj salajroj la kompanioj evitis fali en la manojn de tiu akaparisto.

Krome ekzistis la banditoj. La plej potencaj el ili bonege kunagadis kun la Cang-Kai-Sek-regimo. La patro de Jung-i-jen estis kaptita en 1945 kaj lia familio devis pagi grandegan sumon por lia liberigo. Ankaŭ inter la ĉinaj kapitalistoj estis korupta kaj insida konkurado - kaj inflacio - kaj strikoj ktp." "Do, daurigis Jung-i-jen", kvankam ni, la kapitalistoj, multe pli bone situis ol la laboristaro, la komercado en Ĉinio estis bestejo, kie oni vivis nur per dentoj kaj ungoj."

Dum la jaroj 1949-1951 la kompanioj de Jung-i-jen ne donis profitojn. Oni devis lukti kontraŭ multaj malfacilaĵoj. Cang-Kai-Sek uzis amerikajn aeroplanojn por bombardi la urbegon. Depost 1951 la profitoj plialtigis ĉiu jare. Jung-i-jen estas ĉefdirektoro de la farun- kaj tekstil-fabrikoj kiuj estas kontrolataj de ŝtato kaj privataj kune.

En Peking ĝis okazis konferenco de kapitalistoj el ĉiuj partoj de la lando. Ili diskutis la ŝanĝon al Socialismo: kiom da racia profitado povas veni al ili dum la transira periodo,



la administradajn problemojn de la periodo kaj la, por ili, tre gravan problemon, sin prepari por utila kaj deca vivo en la kadro de socialiginta Ĉinio de la estonto.

Grandan impreson al tiu konferenco faris letero, kiun laboristo skribis al Ĉu-en-laj. Li skribis, ke antaŭ la liberigo li laboradis por kapitalisto en Shanghai. Poste li memvole militservis en Koreio kaj reveninte li trovis, ke kapitalistoj ankoraŭ funkcias. Li skribis "La kapitalistoj agadas multe pli bone ol antaŭe, sed ili ankoraŭ ekspluatas. Kial oni ne forigas ilin? Fidu al la laboristaro - ni bone kaj honeste kontrolos".

Shapiro klarigas, ke por kompreni ĉi tiun sistemon de laŭgrada transiro al socialismo, ni devas memori ke en Ĉinio troviĝas tre MALOFTA FENOMENO; t.e. kapitalista klaso kiu neniam havis/kaj ne-niam havos/politikan regpovon. La plejgrandaj kapitalistoj - "La Kvar Grandaj Familioj", al kiuj apogis Ĉang-Kai-Sek; financaj akaparistoj kiuj kunulis kun la fremdaj imperialistoj; oni konfiskis entute iliajn posedaĵojn post la liberigo. Ĉiom, au preskaŭ ĉiom da peza industrio, bankoj, fervojoj kaj aliaj ne forlas eblaj partoj de la nacia ekonomio jam ŝtatigis. Plue 90% de la pligrandaj privataj entreprenoj estas duope kontrolataj.

Ekster tiuj arangoj troviĝas sep milionoj da privataj kapitalistoj -/tiuj ciferoj enhavas la tutajn familiojn, sed ne la sendependajn metiistojn kaj vendistojn po-malgrandajn/. Eble tiu ĉi nombro ŝajnas al vi iom granda, sed efektive ĝi ne estas tia, rilate al la ĉinia popolnombro. Antaŭ ĉio, ili estas neforigebla parto de la nuna, nesufiĉe evoluigita stato de komerco kaj industrio en Ĉinio. Ankau la registaro rememoras, ke tiu ĉi patriota klaso/la malgrandaj kapitalistoj/positive helpis la liberigan revolucion. Do, la respondo al ĉio ĉi tio estas ke la kapitalista klaso de Ĉinio marŝas, vole aŭ nevole, al socialismo kaj estas devigata partopreni konstrui sian propran

maŭzoleon, ĉar la tuta regpotenco estas en la manoj de la proletaro kaj la popolŝtato.

C. FIELDING

"MEM"-tradukservo

61, Springfield Rd. BRISTOL-6.

"MAKSIM GORKIJ pri ESPERANTO

/Okaze de debato pri internacia lingvo en la Popola Komisariejo por klerigo, en 1919/

"Konservativa opinio obstine argumentas, ke Esperanto estas utopia elpensajo. Sed la viva, laŭ regule evoluiganta realo malrapide, sed des pli energie refutas la argumentojn de la konservativuloj.

Antaŭ 90 jaroj plejparte la homoj konsideris la elektran energion hereza elpensajo kaj freneza utopio; antaŭ 20 jaroj aviado estis konsiderata tia utopiaĵo; telefono estis ankau unu el la "utopiaĵoj", kiujn la homa cerbo efektivigis; pri la radiotelegrafio oni ankau parolis kiel pri frenezajo.

Sed atingante unu venkon post la alia, la nelacigebla homa intelekto farigas ĉiam pli, eltrovema en la batalo kontraŭ la mi-steraj fortoj de la naturo kaj prezentas por solvo ĉiam pli "utopiaĵojn" kaj pli "frenezajn" demandojn kaj problemojn. La mezepokaj utopioj pri "Stono de Saĝulo" kaj "Eliksiro de Vivo" estas nun studataj de mondfamaj scienculoj en iliaj laboratorioj.

La plej bonaj homoj de Rusio klopodas realigi la "Plej Frenezan Utopion" - la sekurigon de sociala egaleco en la tutmondo, kaj tamen ni ne povas diri, ke iliaj klopodoj estas sensukcesaj.

La historio de la kulturo konvinke pruvas, ke la plej sentimaj gvidantoj de la homaro sukcesis dum sia vivo efektivigi multe da "Frenezaj Utopioj" kaj ke tiuj ĉi "Senŝencaj Revoj" ĉiam pli ofte ŝanĝigas en kreajn hipotezojn de sciencoj.

Nun multaj miloj, ja milionoj da homoj unuigas por realigi utopiojn.... kaj guste nun internacia lingvo, unu sola por ĉiuj, estas por la homaro pli nece-



sa ol jam ajn antaŭe.

Se ni sopiras je bona afero, tiam ni ne agas stulte. La nepra bezono de unueca lingvo por la internacia proletaro estas prav-igata per la sameco de la klasaj interesoj kaj celoj de la proletaro.

Mia opinie - Esperanto estas sana kaj por plua evoluigo kapabla germo de internacia lingvo. Jam nun Esperanto havas konsiderinde ampleksan literaturon kaj teorie gi tute sukcese evoluigas. Tiu ĉi laboro progresos konsiderinde pli rapide, kiam en gi partoprenos kleraj filozofoj nome tiuj, kiuj estas konvinkitaj pri la nepra bezono unuigi la homaron.

Oni diras: "Lingvo ne evoluigas malnature".

Mi ne estas esperantisto, sed mi scias, ke tiu ĉi artefarite kreita, rapide evoluiganta lingvo farigas tute natura fenomeno, ĉar gi konformas al la nepra bezono de la puntempa homaro: trovi au krei generale kompreneblan lingvon.

En 1910 mia amiko Aleksandro Semjonoviĉ Jakutskij, konanta ne-nian european lingvon, nur Esperanton, travojagis la tutan Euron. Li faris tion, por persone konvinkigi pri la disvastigiteco de la ARTEFARITA LINGVO. En preskau ĉiu, pli kaj eĉ malpli grava urbo eĉ urbeto en Eropo li trovis grupon da esperantistoj.

Mi estas firme konvinkita, ke la organizita volo de amasoj estas plene kapabla transformi ARTEFARITAJOJN je aĵoj naturaj.

Ja, ĉu la kulturo mem ne estas ARTEFARITAJO?

Ni gisvivis epokon, kiam mal-kultura homo estas konsiderata malamiko de niaj klopodoj kaj malhelpanto de la progreso kaj plua kresko de la kulturo.

Por venkigi la kulturon ni faras revolucion, ni malŝparas ĉiujn fortojn de nia intelekto, de nia volo, kaj oferas nian personan liberecon, eĉ vivon.

Cu estas eble nei, ke unu lingvo, unusola por ĉiuj, forte instigos la procedon de intensa ekfloro?

Tion nei ne estas eble. Tial do

oni devas konsenti pri la nepra neceso de la kreo kaj disflorigo de tia lingvo.

Kopio el "POPOLA MONDO"  
n-o. 17, 1951, pago 213a.

Supran tre gravan raporton disponigis al ni k-do. LIU Zyn el Mukdeno pere de k-do. S.V. Saŝiĉev el Moskvo. Ni dankas al ambau kamaradoj por tiu ĉi grava dokumento, kiun niaj legantoj certe eluzos kontraŭ la malamikoj de Esperanto.

#### LA ZAMENHOF-FESTO EN SOFIO

Okaze de la 96jara naskiĝfesto de nia kara majstro la radiostacio SOFIA disaudigis la 15an de decembro bulgarlingve en la rubriko "Kalendaro" dekminutan prelegon pri la vivo kaj verko de L. L. Zamenhof. En la fino radioparolanto konkludis: "Ni alte priŝtaksas la aferon de Zamenhof, gian humanismon kaj gian kontribuon al la batalo por frateco kaj amikeco inter la popoloj."

La saman vesperon esperantistoj de Sofio arangis Komunan vespermangon en la plej luksa restoracio "BULGARIA" kies orkestro ludis "La Esperon". K-doĵ C. Murgin kaj Asen Grigorov prelegis okaze de la datreveno. El tiu ĉi solena vespero nia redakcio ricevis salutleteron kun multaj bondeziroj al ĉiuj disĉiploj de Zamenhof kaj al la tutmondaj esp-pacdefendantoj, subskribitan de multaj k-doĵ kaj k-dinoj el Sofio.

#### NUR ANTAŬEN!

Kun ĝojo mi informas vin ke en nia gimnazio de VASVÁR/Hungario/fondigis Junulara Esperanto-rondo kun 9 gelernantoj, kiujn mi instruas laŭ Cseh-metodo. Por tio ni ricevis jam komence de novembro permeson de la Instruministario. La kurson kun sukceso partoprenas ankau nia direktoro, k-do Tibor Lányi/mat.-fizikisto/, kiu ĉiam kaj ĉiamaniere helpas nian rondeton. Ni kunvenas ĉiu marde de 17a horo en la gimnazio. Aprile ni intencas arangi grandan Zamenhofvesperon en la Kulturdomo, kies direktoro ankau tre simpatiigas al Esp-o. kaj verŝajne ankau gin lernos. Por nova kurso, ki-u komencos la 2. de jan., varbas belaj pentritaj afiŝoj de niaj lernantoj okulfrape ĉie en la ur-



bo. Jam 14 personoj aliĝis ĉe mi. Nia direktoro volas dum somero kun la rondeto ekskursi por dek tagoj al Ĉeĥoslovakio kaj proponas reciprokan ekskurson por ĉeĥosl. gek-doĵ al Bulgario. Nia loka gazeto "VASMEGYE" kies redaktoro favoras al nia lingvo, jam publikis kelkajn artikolojn pri Esperanto. La raportojn mi liveras el niaj Esp-pagazetoj, kiujn mi ĉiam sciivole atendas.

D-ro, Joz. KONDOR  
Petöfi u. 46, VASVAR, Hungario

- "I O kaj - "U J O"

Pri tiuj du sufiksoj jam estis multaj debatoj. Laste mi ricevis akran kritikon de d-ro Adolf Halbedl el Knittelfeld/Austrio/, kiu serioze protestas, ke mi ŝanĝis en liaj artikoloj por "L.P." lian "-ujon" per mia "-io" kaj li plendas, ke li kiel delegito de UEA ne povas toleri tian fundamentan ŝanĝon.

Mi opinias ke la sufikso-ujo povas esti uzata kiam temas ekz. pri "inkujo", salujo", cigaredujo" alumetujo ktp; simple dirite, kiam temas pri io, kion oni povas meti en ion, sed ne por lando, kiu konsistas el anoj, popoloj, kiuj al ĝi apartenas. En niaj oreloj sonas strange, kiam iu diras Francujo Ĉeĥoslovakujo, Islandujo, Svedujo ktp. La Francoj, Ĉeĥoslovakoj ktp. ja ne troviĝas en iu ujo", sed estas anoj de lando, de nacio, de anoj de io, de societo, de SOCIO. Sekve ni devas diri Ĉeĥoslovakio Francio ktp. Mi kredas, ke se ni dirus Ĉeĥoslovakujo, ke tio signifus, ke Ĉeĥoslovakoj troviĝas en iu "UJO" el kiu eblas ilin elpreni kvazaŭ fiŝojn el "Akvarujo" aŭ cigaredon el cigaredujo. Alivorte, ni estus "enujigitaj" kiel alumetoj. Kvankam oni moki diras "Malantaŭ Fera Kurteno", mi tamen ne sentas min enujigita, sed nur ano de Ĉeĥoslovakio kaj ne de iu ujo, el kiu mia eliro dependus de la volo de la posedanto de tiu "ujo". R. BURDA

ANKORAŬ IOM PRI HUNGARIO

Regulaj kunvenoj de la Esp-Pac-Rondo en Budapeŝt pruvas seriozigon kaj viglecon de la movado. Post sukcesplena Finna-Vespero okazis la 1. de decembro lumbildparolado pri atommalito kaj la de-

truo de firoŝima. Malerman paroladon pri atomenergio faris laŭ teksto veninta el Ĉeĥoslovakio k-do d-ro. Mátéffy. La 20a kunveno de -post la fondiĝo ĵus okazis la 15. de decembro kaj farigis sukcesplena Zamenhofvespero, dank al la grandaj klopodoj de k-do. Egervári, kiu per sia poŝtkart-eksponicio belege ornemis la klubojn. Pro la malbona vetero kunvenis nur ĉ. 50 gek-doĵ, inter ili eĉ kelkaj el malproksimaj provincklokoj, por denove inde komune festi la kreinton de nia lingvo. Post kanto dela "Espero" sub gvido de nia malnova k-do. Sárosi kaj post deklamo de "La Vojo" de k-do. Balkányi, - k-do Julio Baghy en sia elokventa kaj profundsenca parolado detale prelegis, precipe skizinte la ekonomiajn kaj politikajn ĉirkonstancojn, kiuj kreis la taŭgen atmosferon por aperigo de internacia lingvo. Li kontraŭis la aserton, ke Esperanto volas esti mondlingvo k simile en hungarlingva parolado k-do Mátéffy klarigis, ke Esperanto ne povas esti ia, danĝera, kontraŭnacia kaj kontraŭsocialista kosmopolitajo, kiel estas modo akuzi ĝin. La lingvon de Zamenhof ni devas uzi por niaj celoj, por konstrui socialismon kaj pacon! El originalaj kantoj de Sárosi, ĉarme prezentis kelkajn k-dino Ida Bundai. Plejŝatata kaj interesa programero estis la sonrubando prezentinta islandan porpacan kanton kontraŭ la usona militokupo kaj kontraŭ la uzo de atombombo, esperante kantita de operkantisto el Reykjavík kaj akompanata de islanda laborista ĥoro sub direkto de la komponisto. La magofonrubando, sendita kiel pacsaluto de islandaj gek-doĵ pruvis la solidarecan kunlaboron kaj amikan kulturkontakton kaj ankau la valoron kulturan de Esperanto. Grandan impreson vekis la bonega deklamo de k-do. Joh. Gyenes, prezentanta novan poemon de Baghy: "Ne plu militon!"

Instruisto L. Tóth en vilaĝo Gomba instruas 6 pedagogojn kaj 6 infanojn. En alia vilaĝo gvidas kurson instruisto M. Farkas por 12 lernantoj. La revuo de Kulturdomo en Hódmezővásárhely publikadas rubrikon kun gravaj raportoj pri en- kaj eksterlandaj okazintaĵoj./.



Ankaŭ kurso komenciĝis tie. Nova fakrondo fondiĝis ĉe la Kulturdomo de urbo Békéscsaba. Pri la aktiveco de la Esp-rondo en la gimnazio de Vasvár raportis partia ĵurnalo de urbo Szombathely.

Pál BALKANYI

+/Nomo de esperantisto estas:

Gudmundur Jonsson, de la muzikisto: Sigursveinn Kristinsson, la Esp-traduko de O. Ingmarsson. La megafonrubando de islanda "MEM"

### "ĈU KUN OFICIALA PERMESO?"

La titolo estas iom moka, sed kiom da leteroj, instigoj, riproĉoj kaj kuragigoj mi devis oferi, por fine konvinki k-don. Balkányi, ke porpaca laboro per Esperanto en Popoldemokratioj ne bezonas oficialan permeson. Konsideru kiel ŝanĝigis lia situacio:

### LI ESTIS OFICIALA FLORKRONITA

Okaze de landa konferenco de amator-korespondantoj de la hung. revuo "UJ VILAG"/Nova Mondo/k-do P. Balkányi/hung. MEM-peranto/ raportis pri sia korespond-laboro per Esperanto kun diverslokaj sovjetaj pacdefendantoj, scienculoj, laboristoj, helpante praktike realigi la hungar-sovjetan amikecon kaj kiel per tutmonda korespondado li povas kunhelpi per artikoloj kaj leteroj diskonigon de sovjeta kaj alia progresema kulturo. Okaze de tio oni distingis k-don. Pál BALKANYI el Budapeŝto per la "Argent-florkrona honor-insigno" de la Hungar-Sovjeta Societo.

Kun gojo ni gratulas al nia kara FLORKRONITULO.

R. Burda

### Ĝ O J I G A R A P O R T O

Samtempe kun la adiaŭo kun la malnova jaro, ni adiaŭas ankaŭ kun nia gisnuna Distribuejo de "L.P." en Kopřivnice. Kvankam dum la lasta tempo ĝia laboro tute perfekte ne funkciis, tamen ni estas multe dankemaj al la rondeto en Kopřivnice kaj speciale al k-dino Marta Hřčková kaj k-do Zdeněk Figar, kiuj dum la tuta tempo klopodis fari sian eblon.

De la nova jaro kun tiu ĉi n-o ni kore bonvenigas novan eldonanton kaj distribuanton, kiu dank'al nia entuziasma kamarado Alfred MACEK, pastro kaj Kanoniko de la

Sankta Venceslaŭ Epiŝto en urbo MIKULOV aranĝis, ke de januaro 1936 eldonigos nia cirkulero sub la firmao de la Esperanto-rondeto ĉe Distrikta Packomitato en Mikulov/Moravio/.

Okaze de la nova jaro ankaŭ nia multobligisto decidis, donaci al niaj legantoj du pagojn senpage. Sekve, tiu ĉi numero konsistas el 12 pagoj kaj la redakcio esperas, ke vi ĉiuj tion bonvenigas.

### KIU VOLAS KALUMNII K-don BOKAREV?

Sur titolo-pago de uzina gazeto "ŽAR VYSOCINY" kiu eldonas la Kompartia organizon de la Maŝin-fabrikoj kaj fandejoj en urbo ŽDAR n/S. aperigis iu malkuragulo sub la pseŭdonimo "-on-" en n-o. 21 de 18. nov. unukolonan artikolaĉon kontraŭ Esperanto rekomdante la fuŝlingvon "INTERLINGVO"/Okcidental/. Ĉi artikolon li finas per jenaj vortoj: "krom tio la "interlingvistoj" povas fieri, ke ili antaŭ nelonge ricevis leteron de vicprezidanto de la Moskva Lingvo-Instituto kaj membro de Sovjetunia Scienca Akademio, k-do. BOKAREV, kiu invitas al amika korespondado kaj estas tute skribita "interlinque".

Kompreneble multaj eminentaj Espacdefendantoj jam energie riproĉis al la redakcio tiun publikajon sed estas necese kaj ni invitas la k-don Bokarev, ke li mem skribu al la redakcio sian opinion. Jen la adreŝo: Redakce záv. časopisu KSČ, "ŽAR VYSOCINY", Strojírny a slevárny - ŽDAR nad Sázavou, C.S.R.

### ESPERANTO EN SOVJET-ARMENIO

Mi nun estas kun kelkaj esperantistoj de Erevan okupata per organizado de Esp-kursoj. La 2./12. okazis en la Universitato de Erevan la unua kunveno de interesuloj. Ĉiuj ĉeestantoj estis profesoroj, doctoj kaj sciencaj laborantoj de la universitato. Ili ĉiuj esprimis la deziron lerni Esperanton kaj, ĉar ankoraŭ estas aliaj profesoroj kaj lektoroj, kiuj deziras aligi, ili decidis venontsemajne ĉiujn kunvenigi kaj komenci la lernadon. La instruadon gvidos malnova esp-isto, prof. d-ro. Gurgen SEVAK. Post kelkaj tagoj ekfunkcios plua lernogrupa por studentoj en la pedagogia instituto, kiun verŝajne mi



mem gvidos. Pri la rezultoj mi certe informos vin.

Mi deziras gojigi vin, ke nun mi kaj ankaŭ aliaj gek-doj en nia kaj aliaj urboj de Sovjet-Unio ricevas regule kaj tre libere ĉiajn gazetojn, jurnalajn kaj librojn el eksterlando. Ekz. lastatempe nin atingis tiaj el Japanio, Nederlando, Svedio, Italio kaj ankaŭ el popoldem. landoj. Kun profunda danko mi ricevas la revuojn "Paco" kaj "La Pacdefendanto", kiuj tre vigligas crevanajn esperantistojn. S. Mkrtiĉjan

NI GRATULAS

al la gefianĉigo de nia kamarado LIU Zyn kun k-ĉino ZANG Jun-gin, ambau el MUKDEN/Ĉinio/, kiu okazis la 22/11 en Mukden kaj al ilia baldaua edzigfestoj ni deziras ĉion plejbonan al ilia komuna vivo kaj agado por la E-pacmovado.

La redakcio

TUTE SENPAGE

vi povas legi ampleksaan, plejnovan Esperanto-literaturon el diversaj landoj pere de nia

"MIGRANTA BIBLIOTEKO"

de L.P. Petu la librokatalogon ĉe k-do. Alois ZMEŠKAL, Celetná ĉ.2, PRAHA-I. Por la respondu bonvolu aldoni poŝtmarkon. Eksterlandaj pacamikoj bonvolu donaci superfluajn, jam tralegitajn librojn al la menciita bibliotekisto. Ni tre dankas.

NI AKCEPTAS INTERŜANĜON DE ELDO-NAJOJ KUN ĈIUJ REDAKCIOJ en 1956

NIA MOVADO EN ĈEĤOSLOVAKIO

NOVÝ BOR, la 13. de dec. aranĝis nia entreprenita klubo "Barské Sklo" Zamenhofan vesperon kun alterna programo en la unua duono kaj la dua estis dediĉita por adiaŭa vespero kun k-do. Richard WENZEL, kiu translogas al Okc. Germanio. MOST, laŭ decido de la reg. komitato de la Ligo de Laborantoj en karbminejoj de Most kaj laŭ decido de la Regiona Klubo de ministoj en Most, la lasta estis komisiita likvidi la en sia kadro ekzistantan Esperanto-rondeton kaj kurson. Al la kursanoj la klubo redonos ilian karskotizon. La gvidanto de la rondeto, k-do. Jan Uhlik, Zelináňská 32, MOST, jam entreprenis proteston kaj aliaj

kun ĝi ankaŭ komencas por nia administracio novaj elspezoj. Se ni volas sekurigi sufiĉan paperrezervon, presigi titolon kaj kovertojn, aĉeti ĉiujn ceterajn bezonaĵojn, kiuj garantias la regulan eldonadon de nia organo por tiu ĉi jaro, tiam estas necese, ke niaj legantoj gustatempe, kiel eble plej frue renovigu siajn jarabonojn ne atendante ĝis la jarmino, kiel iuj kutimas. Ankaŭ la administracio de -vas ĉiun materialon antaŭmendi k pagi! Helpu ankaŭ verbi novajn abonantojn en-kaj eksterlandajn.

Jarabono por LA PACDEF. = 16.-Kĉs

Jarabono por PACO = 16.- "

Samaj prezoj = por eksterlando.

Bulgara BULTENO-1956 = 15.-Kĉs

Pola BULTENO-1956 = 13.- "

Neregula japana virina bulteno "CERIZO" kostas 5.-Kĉs

Pagu per ordinara poŝtpagilo k. ne forgesu sur ĝi noti por kio vi pagas kaj legeble skribu vian adreson/preferu preslitero/rekte al k-do. Rud. BURDA, Palackého nám. ĉ.6, PLZEŇ, Ĉeĥoslovakio. Escepte "PACO"n kiun eblas pagi al nia MEMperanto k-do. František LIČKA, Březí ĉis.12 OSTRAVA-Zábřeh. PACOn ni ne povas liveri al eksterlando. Eksterlandanoj abonu ĝin ĉe siaj perantoj.

POR VIA KORESPONDADO

uzu unusole nur niajn porpacajn Esp-poŝtkartojn kaj leterpaperon, kiu ne estas plikosta ol ordinara Mendu. ĉe: k-do. Josef REISER, Kraj. správa spojů, Tylova ul. PLZEŇ.

PLZEŇ, la Esp-rondeto translogis al nova, pli bela klubejo en hotelo "Anglický Dvůr"/nun "Plzeňský dvůr"/La 16/12. okazis solena Zamenhof-vespero kun interesa programo. Prelegis d-ro. J. Černý kaj R. Burda pri la rolo de nia majstro en la pacmovado. Regulaj kunvenoj, kiujn partoprenas 20-30 gek-doj okazas ĉiu vendrede de 19a horo ĉiam kun interesa programo. Oni decidis membrotizon 20.-Kĉs inkluzive ricevon de L.P. por 1956. POPRAD, rilate la proteston de la MEM-prez. k-do. Burda ĉe la partio en Košice, tiu respondis, ke la likvidon de la Esp-grupo en Poprad oni komisiis diskuti en la centro kaj kun la TKKE en Praha.



K O R E S P O N D I D E Z I R A S :

K-do. Emil POLICKY, /stud. de maŝin-  
ing. fako/ Ul. Febr. vítazstva, VSD -  
J/305, BRATISLAVA, Ĉeĥoslovakio, kun  
ĉiuj landoj per il. p. k. kaj let.  
K-do. SAVOSTIANOV, Glavny počtamt,  
Poŝtkesto N-o. 466, MOSKVA, Sovjet-  
Unio, kun ĉ. landoj pri literaturo,  
poezio, belarto, muziko, seksprobl.  
Interŝangas librojn kaj revuojn.  
Bulgaraj esp-istoj klopodas resta-  
-rigi Esp-radio-elsendadon. Gekdoj  
petu multnombre, ke vi deziras aus-  
-kulti rilaciojn pri politiko, kul-  
-turo, scienco, muzikon ktp. Skribu  
al: "RADIO-SOFIA" Bulgario.  
K-do. Vladimír STEFEK, Olomoucká 14  
VYSKOV na Moravě, Ĉeĥoslov., kun la  
tuta mondo pri diversaj temoj. An-  
kau kun ĈSR. Certe respondas.  
Vietnamaj gek-doj dez. ricevi Esp.  
lernolibrojn kaj vortarojn en  
franca lingvo. Ili povas rekompenci  
per belaj afiŝoj k.a. materialo  
Adreso: K-do. Nguen Van KINH, 2, Ly  
thuong-Kiét, HANOI, Viet-nam.  
K-do. Stefan STEFANOV, Esperanto-  
kurso, Teknika Gimnazio, RUSE, Bulg.  
ŝerĉ. koresp. por siaj gelernantoj.  
Ĉiu ricevos respondon.  
K-do. Stefan Dimitrov DIMITROV, Str.  
"Stalin" No. 107, RUSE, Bulgario, kun  
ĉiuj landoj. Certe respondos.  
K-do. Petar Il. TAGAROV, Vasil Kolarov  
14, RUSE, Bulgario, per il. p. k.  
ESPERANTO-KURSO/40 lernantoj/ In-  
stituto J. Battel y Ordenez, Av. Ag-  
raciada 2025, MONTEVIDEO, Urugvajo.  
Societo "VERDA STELO", Zernjanin,  
Provinco Vojvodina-Banat, Jugosla-  
vio, petas materialon por leterves-  
pero, kiun gi laueble rekompencos.

Novfondita Esp-Pac-rondo deziras  
viglan koresp. kun tutmondaj esp-  
pacdefendantoj. Adreso: "ESPERANTO  
PACRONDO", Balassi Bálint Kultur-  
ház, Luther-u. BEKESZABA, Hungario.  
K-do. Ewald MAYER, CUNERSDORF über  
Königstein, Germanio-DDR, interŝan-  
-gas p.m. kaj let. kun ĉ. landoj.  
Hungaraj gek-doj klopodas insti-  
gi radio-dissudigon en Esp-o. Sub-  
-tenu ilin per petskriboj pri el-  
-sendo de regulaj esp-raportoj  
pri Hungario, la Esp kaj pacmova-  
do ktp. Adreso: RADIO-BUDAPEST, su-  
fiĉas. Informi ankaŭ la MEMperant.  
K-do. Ĥristo Ivanov ĤRISTOV, strato  
Jako Ivanov 124, CIRPAN, Bulgario,  
kun ĉiuj landoj.  
K-do. Stojko Dimitrov VELĈEVSKI,  
Mahala Velĉevska, TROJAN, Bulgario  
kun ĉiuj landoj.  
K-do. Aleksandr Petrakev PETRAKEV,  
/stud. de sup. fin. ekonom. instit./  
Str. "Dojran" 21, SVIŠTOV, Bulgario,  
kun ĉiuj landoj. Pri vivo, kulturo,  
literat., ĵurnalaro, ŝakludo.  
K-do. Nikola Radoslavov KOLEV, Str.  
"V. Kolarov" 36, RUSE, Bulgario, pri  
vivo k. moroj. Interŝ. il. p. k., p.m.  
K-do. ARVEDO Vätra, Tallinas iela  
n-o. 58-28, RIGA, Latvijas P.S.R.,  
kun ĉ. landoj pri ĉiu temo.  
K-do. S. K. PAIK, /stud. de veter. med./  
115, Bukchang-Dong, Ri-Ri, Ĉeĥnola  
bukdo, Koreio, pri interesaj temoj.  
K-do. Alois NEUMAN, Dorazdova ĉ. 4,  
BRNO, Ĉeĥoslov. kun ĉ. landaj foto-  
amatoroj por interŝ. fotojn, il. pk.  
kaj spertojn.  
Ordinara anonco kostas 3.-Kĉs aŭ  
3 int. resp. kuponojn.

M U N I C I O P O R N I A B A T A L O

K-do. B. Hruška-Ostrava-M.H. . . . . 10.-Kĉs	K-do. V. Růžička-Děčín. . . . . 4.-Kĉs
K-do. A. Neuman-Brno. . . . . 4.-"	K-do. L. Proskovec-Plzen. . . . . 4.-"
K-do. J. Hylák-Plzen. . . . . 20.-"	K-do. L. Plevka-Hor. Bříza. . . . . 9.-"
K-do. Kanoniko A. Macek-Mikulov 13.-	K-do. K. Opavský-Olomouc. . . . . 3.-"
K-do. A. Klimša-Třinec. . . . . 4.-"	K-do. V. Spür-Doksy. . . . . 4.-"
K-do. M. Rybín-Part. Lupča. . . . . 9.-"	K-do. Vl. Štefek-Vyškov n/M. . . . . 5.-"
K-do. J. Ballay-Brno. . . . . 2.-"	K-dino. A. Godková-Praha. . . . . 2.-"
K-do. N. Čekal-Děčín. . . . . 4.-"	K-do. K. Činčera-Děčín. . . . . 3.-"
K-do. V. Miler-Kralovice. . . . . 18.-"	K-do. B. Šotek-Dětmanovice. . . . . 4.-"
K-do. D. Prandorfi-Otrokovice. . . . . 8.-"	K-do. V. Vyepálek-Praha. . . . . 3.-"
K-do. J. Kazda-Karlovy Vary. . . . . 6.-"	K-do. V. Kaplánek-Mar. Lázně. . . . . 4.-"
K-do. J. Pátek-Holešov. . . . . 4.-"	K-do. J. Lederer-Sluknov. . . . . 4.-"
K-dino. A. Valjanová-Galanta. . . . . 6.-"	K-do. J. Veselý-Kostelec n. Čl. . . . . 4.-"
K-dino. H. Žáková-Pardubice. . . . . 4.-"	K-do. Fr. Pecka-Jablonec n/N. . . . . 3.-"
K-do. V. Jindřich-Vráž. . . . . 9.-"	K-do. O. Tomar-Děčín-V. . . . . 4.-"

Elĉonis: OKRESNÍ VÝBOR OBRÁNCŮ MÍRU - M I K U L O V -odbor esperantistů  
Redaktis: K-do. Rudolf BURDA, Palackého nám. č. 6, PLZEN, Ĉ e ĥ o s l o v .